



I. Lingvokonaj taskoj

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

Solve la subajn taskojn!

Proponita labortempo: 40 minutoj

1. Elektu la ĝustajn prepoziciojn!

Ĉiujn prepoziciojn uzu nur unufoje! Du el la listo estas superflujaj!

al, apud, da, de, el, je, kun, po, por, pri, pro, per

La infanoj manĝis ___ (1) du pomojn.

Silvja telefonis ___ (2) Dario por demandi ___ (3) la rezulto de la aŭkcio.

Antaŭ la enlitiĝo mi preferas tason ___ (4) teo!

Irena venis por babili ___ (5) vi.

Li venos ___ (6) Nepalo morgaŭ nur ___ (7) ricevi la Nobelpremion.

Paŭlo sidis ___ (8) mi en la buso.

Li ne povis ekveturi ___ (9) la malbona vetero.

Mi malsaniĝis ___ (10) gripo.

**2. Kompletigu la frazojn per konvenaj tabelvortaj pronomoj!
Uzu ĉiujn nur unufoje! Du el la listo estas superflujaj!**

ĉiam, ĉie, iam, iu, kiu, kion, neniam, nenio, tie, tia, tiel, tion

_____ (1) diris al mi, ke Maria ankoraŭ _____ (2) estis ĉe
kosmetikistino.

La horloĝo estas _____ (3) sur la muro, por ke ni _____ (4) vidu
ĝin.

Ne scias la mano dekstra, _____ (5) faras la maldekstra.

Hodiaŭ okazis _____ (6) interesa.

Kun _____ (7) vi festas, _____ (8) vi estas.

_____ (9) mi tre volonte irus kun vi al kinejo.

_____ (10) estas bone, sed plej bone estas hejme.

3. Skribu en la liston la mankantajn pronomojn en korekta formo!

Ofendo kaj pardono

Du amikoj promenis en la dezerto. Dum la ekskurso ili ekkverelis, kaj unu amiko vangofrapis la alian, kiu ofendiĝis, kaj senvorte skribis en la sablon: „Hodiaŭ mia plej bona amiko vangofrapis _____ (1).”

Ili iris plu en la dezerto kaj atingante oazon ili banis _____ (2). Tiu amiko, kiu estis vangofrapita, neatendite subakviĝis kaj preskaŭ dronis, sed la alia savis _____ (3). Kiam li rekonsciiĝis, li ĉizis en ŝtonon: „Hodiaŭ mia plej bona amiko revivigis _____ (4).”

Tiu amiko, kiu estis la vangofrapanto kaj baldaŭ la savanto, demandis: „Kiam mi frapis _____ (5), vi skribis _____ (6) opinion en la sablon kaj nun vi ĉizis en la ŝtonon. Kial?”

La alia repondis: „Kiam iu ofendas _____ (7), nur en sablon licas skribi, por ke la vento de la pardono povu nuligi la vortojn. Sed se iu helpas _____ (8), ĉizu tion en ŝtonon por ke neniu povu nuligi _____ (9)!”

Konkludo: Skribu _____ (10) ofendojn en sablon, sed la bonfaron ĉizu en ŝtonon!

1.
2.
3.
4.
5.
6.
7.
8.
9.
10.

4. Elektu la ĝustan vorton por kompletigi la frazojn!

1. Ĉu li petis, ke vi ... lian hejmtaskon?
A) skribas B) skribu C) skribus D) skribis
2. Li estas sincera homo, kiu ĉiam diras ... opinion.
A) si B) al sia C) lian D) sian
3. ... la ilon, se vi mem ne povas tion fari.
A) riparigu B) ripariĝu C) riparu D) riparadu
4. Ĉiu miraklo daŭras nur ... tagojn.
A) triajn B) trian C) tri D) triaj
5. Ekzistas viroj, kiuj devas ... plurfoje tage.
A) razi ilin B) razi C) razi sin D) razigi
6. Ĉu vi jam ... la legadon?
A) finiĝos B) estas fini C) finlegi D) finis
7. Ĉi tiu libro kostas ...
A) 80 eŭrojn B) 80 eŭroj C) en 80 eŭroj D) 80 eŭron
8. Mi revenis
A) en hejmen B) hejme C) hejmen D) hejmo
9. Ili konas ... de antaŭ tri jaroj.
A) unun la alian B) unu la alian C) unu la alia D) unu kaj alia
10. La virino elektinte la jupon iris al la kaso ...
A) por pagi B) ke pagi C) al pagi D) de pagi

II. Skriba sinesprimo

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

**Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi 17–20-linian leteron!
Via letero traktu ĉiun proponitan eron, sed ĝi ne superu la postulatan amplekson; atentu pri la kohereco de via teksto!
Ne forgesu la formalizaĵojn de la letero (alparolo, saluto, dato, subskribo)!**

Proponita labortempo: 60 minutoj

I.

Via amik(in)o demandas vin pri via libertempo.
En via respondo skribu pri tio,

- kiam, kie vi renkontas geamikojn, kion vi faras kune
- kiajn programojn vi rigardas en la televido, kial
- kiuj estas la plej ĝenaj bagatelaĵoj kiuj forrabas vian tempon
- kiujn gravajn taskojn vi havas, pro kiuj mankas al vi libertempo
- kion vi farus, se vi havus pli da tempo.

AŬ:

II.

Via amik(in)o demandis vin pri tio, kiel vi rilatas al lingvolernado.
En via respondo skribu pri tio,

- kiujn lingvojn vi lernis ĝis nun, kie, kiel
- kiujn lingvojn vi parolus volonte, kial
- kiajn malfacilaĵojn vi havas dum lingvolernado
- kiuj metodoj estas por vi la plej taŭgaj
- kiam manko de lingvoscio kaŭzis problemon al vi.

III. Lega kompreno

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

III/A

Legu la suban tekston kaj solvu la taskon!

Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu parto: 8

Proponita labortempo: 40 minutoj

Evoluo de katidoj

La katidoj naskiĝas kun hararo, sed ili estas blindaj kaj surdaj. Ili pezas proksimume 100 gramojn. Helpe de la flarsenso ili trovas cicon de sia patrino. Dum la unuaj tagoj post la naskiĝo la katino preskaŭ ne malproksimiĝas de la katidoj. Nutraĵo, akvo kaj kata necesejo tial devas troviĝi en ŝia proksimeco.

Dusemajnaj katidoj malfermas la okulojn, ili atenteme aŭskultas. Ili pezas ĉirkaŭ 200 gramojn. En tiu ĉi periodo ili komencas percepti siajn gefratojn kaj la proksiman ĉirkaŭaĵon, en kiu ili troviĝas. Ili lernas moviĝi kaj ekde la tria semajno eblas rimarki la unuajn katajn ludojn, dum kiuj ili lernas kuri, salti, ĉasi kaj ili ekkonas sian pli vastan ĉirkaŭaĵon. Fine de la unua monato de sia vivo ili pezas ĉirkaŭ 300 gramojn kaj ili komencas purigi sin mem. La periodo inter la kvina kaj la sepa semajnoj estas grava por la ensociigo de la katidoj. La katidoj kreas por si interrilaton kun la propra specio kaj ankaŭ kun specioj, kun kiuj ili interkontaktiĝas en tiu ĉi periodo. La katidoj, kiuj ne havis eblecon interrilati kun homo, evitos homojn dum la tuta vivo kaj ili neniam iĝos karesiĝemaj katoj. 10 semajnaj katidoj jam estas pli singardaj se ili vidas ion novan.

Ekde la dua, en la libera naturo nur ekde la kvara monato komenciĝas por la katidoj la lernoĵaro. En la sesa monato la katidoj estas sendependaj de la patrino.

Surbaze de la teksto decidu, ĉu la subaj asertoj estas veraj aŭ falsaj!

	V	F
1. Katido tuj post la naskiĝo ankoraŭ ne aŭdas.		
2. Ĝi trovas la patrinan mamon helpe de sia nazo.		
3. La ĵus naskinta patrino forlasas siajn idojn por serĉi manĝaĵon.		
4. Duonmonata katido jam uzas siajn okulojn.		
5. Ĝia naskiĝpezo triobliĝas dum la tria semajno.		
6. Se la dumonata katido ekkonas hundon, ĝi poste ne timos ĝin.		

7. Katoj, kiuj ekkonas homon je la aĝo de tri monatoj, povas fariĝi tre amikemaj.		
8. Duonjara katido estas jam memstara.		

III/B

Legu la suban tekston kaj surbaze de ĝi solvu la du taskojn, kiujn vi trovas post la teksto!

Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu parto: 12

Proponita labortempo: 40 minutoj

Mundaneum: papera antaŭaĵo de Interreto

En Belgio ekestis kaj ankaŭ nun estas konservata grandega kolekto, per kiu la iniciatintoj klopodis kunigi kaj disponigi ĉiujn sciojn de la mondo. Antaŭ jarcento la ideo ne estis realigebla pro teknikaj limigoj, nun tio ne plu estas bezonata _____ (1)

Paul Otlet (1868-1944) studis juron, sed li multe pli interesiĝis pri bibliografio, kaj dank' al la familia kapitalo, li povis dediĉi sin dum la tuta vivo al sia pasio. Li, kun *Lafontaine*, plievoluigis la „*Dewey*”-klasifikon por bibliotekoj (1876, nun ankoraŭ uzatan en Nord-Ameriko) ĝis la apero de Universala Dekuma Klasifiko (UDK), unuafoje publikigita en 1905 kaj nun ĝenerale uzata en Eŭropo kaj Azio. _____ (2)

Henri Lafontaine (1854-1943) studis internacian juron, aktivis en la antaŭmilita pacmovado, kaj pro sia aktiveco ĉe internaciaj organizaĵoj li kunrespondecas pri la grava rolo, kiun nun havas la urboj Hago (Nederlando) kaj Bruselo (Belgio). Li estis inter la fondintoj de la Unio de Internaciaj Asocioj. _____ (3)

En 1895 *Otlet* kaj *Lafontaine* kreis la Internacian Bibliografian Oficejon. Ili celis registri sur sliparo ĉiujn verkojn iam aperintajn kaj aperontajn. _____ (4) Nun ne plu eblas fari tion, ĉar la sama kvanto aperas en malpli ol jardeko kaj aldonendas la verkoj, kiuj nur elektronike ekzistas. Krome, la oficejo – kiun oni poste nomis „*Mundaneum*” – kolektis gazetojn kaj revuojn (100 000), afiŝojn (12 000), amason da etaj dokumentoj kaj objektoj ktp.

La apogeo estis atingita dum la periodo 1919-1934, kiam *Mundaneum* havis sian sidejon en „*Palais mondial*” (monda palaco), konstruita okaze de la 50-jara ekzisto de Belgio. _____ (5)

En 1934 *Mundaneum* estis abrupte fermita pro tribunala decido, ŝajne kun politika motivo. En 1941 *Mundaneum* translokiĝis al konstruaĵo senpage disponigita de la urbo Bruselo en la Leopoldparko, apud la nuna eŭropa kvartalo. Tie ĝi restis 30 jarojn, ĝis la urbo deziris mem uzi la spacon. De tiam *Mundaneum* vagadis de unu loko al alia, kaj granda parto de la kolekto perdiĝis aŭ difektiĝis. Fine en 1996, *Mundaneum* estis savita de la Franclingva Komunumo de Belgio kaj ricevis taŭgan sidejon en iama vendejo en urbo *Mons*. _____ (6)

**1. Trovu la lokon de tiuj frazoj en la teksto!
Indiku en la tabelo la koncernajn literkodojn!**

- a. En 1913 li ricevis la Nobelpremion pri paco.
- b. Ĉar anstataŭe venis Interreto.
- c. Ankaŭ la normigita biblioteka slipo estas ilia kreaĵo.
- d. Nuntempe la restinta materialo plenigas proksimume 6 km-ojn da bretoj.
- e. Tiam ĝi disponis pri dekoj da salonoj kaj la informoj estis facile alireblaj.
- f. Tiam la ideo ŝajnis realigebla: oni taksas, ke ĝis tiam aperis entute 800 000 libroj.

1.	2.	3.	4.	5.	6.

2. Respondu mallonge al la demandoj surbaze de la supra teksto!

1. Kio ebligis al sinjoro *Otlet* okupiĝi pri sia hobbio?
2. Kio estis la antaŭa nomo de *Mundaneum*?
3. Kial sinjoroj *Otlet* kaj *Lafontaine* iniciatis la projekton *Mundaneum*?
4. Kial ne eblus realigi nun ilian revon?
5. Kial ĉesis funkcii *Mundaneum* la unuan fojon?
6. Kial ĝi ĉesis funkcii la duan fojon?

1. _____
2. _____
3. _____
4. _____
5. _____
6. _____